

## Radio Ĉerizo 18

2012-01-23

Radio Ĉerizo parolas pri la "nov-jaro" hodiaŭ

Ĉu vi konas, ke komenciĝis la nova jaro hodiaŭ? Ne rigardu min freneza, ke jam pasis 3 semajnoj post la komenco de la nova jaro! En multaj aziaj landoj hodiaŭ estas la vera komenco de la nova jaro laŭ "luna kalendaro". Spektu televidilon aŭ aŭskultu al radio, kaj vi vidos aŭ aŭdos celebrajn vortojn kaj eventojn ĉe la nova jaro.

De antaŭ 150 jaroj rapida modernigo disvastiĝis en Japanio, kontraŭ premoj de eŭropaj imperiismoj, pro timo al subpremiĝo. Sociaj sistemoj tute ŝangiĝis, kaj eĉ vivkutimoj estis rigarditaj antaŭmodernaj, kaj oni forĵetis multon de tiam, se tio ne estus renovigita.

Jen unu ekzemplo. Vi eble scias japanan utaon kaj hajkon, la tradiciaj tipaj lirikoĵoj. Sed ili alfrontis krizon de pereco, ĉar liaj kantostiloj estis malfreŝaj kaj ordinaraj. En poemfarado oni ne trovis ĝojon kaj kulturon en ili ambaŭ. Tiam aperis genia kaj talenta reformisto *Masaoka Ŝiki*, kaj donante ŝokojn al socio, gvidis multajn disĉiplojn en la mondoj de utao kaj hajko, kaj forpasis je la juneco 34-jaraĝa pro malsano. Se li ne aperus, utao kaj hajko jam estus pereintaj, kaj oni dirus, ke ekzistis tiaj poemaj stiloj en historio.

Nu, ni revenu al kalendaro. Mi antaŭe parolis pri la korea sezondramo

"Vintra Amkanto" aŭ "Vintra Sonato" de reĝisoro Jun Sohko, kion mi spektis per DVDoj aĉetitaj en Koreio, 2002, antaŭ unu jaro de NHK-brodkasto en Japanio.

Ĉefpersono *Kan Ĝunsan* mortis pro la trafika akcidento sur neĝa vojo, la 31-an de decembro, 1992, dume en la sama tempo ĉefpersonino *Ĉon Jujin* atendis lin sur la neĝanta strato kun promeso renkonti tie, sed vane. La sekvantan tagon ŝi iris al la lernejo kiel ordinare, iom grumblante kaj akuzante lian promesrompon. Kaj en la klasĉambro ŝi ekkonis lian forpason tute ne atenditan, vidinte plorkriantajn gestudentojn. - Ĉu vi sentis ion strangan en ĉi tiu rakonto? Ja, tiu tago estis la unua de januaro, ĉu ne? Tio ne estis feria tago en tiama Koreio - ekstersupoza afero al japanoj, kiuj havas 3 tagojn liberajn ĉe la komenco de januaro.

Alia punkto. En malnovaj tagoj kalkulado de aĝoj estis malsama. En la tago de naskiĝo, la bebo estas unujaraĝa. En novjaro tiu havas plian aĝon, kaj tiu fariĝas 2-jaraĝa, dume naskiĝtago ne gravas. Se la bebo naskiĝus en la lasta tago de decembro, tiu fariĝus 2-jara morgaŭ, en la 1-a de januaro. Oni diras tiun sistemon "kazoe", japanlingve. Interese, ĉu ne?

Kiam mi iris al Koreio antaŭ pli ol 10 jaroj kun studentinoj de 2-a lernejjaro. Interŝanĝante salutojn, japanaj studentoj miris, ke koreaj gestudentoj estas pli aĝaj ol ili, ĉar la fraŭlinoj ne dubis, ke ni kaj ili estas en sama lernejjaro. Ridinte; japanoj diris veran aĝon, dume koreoj prezentis "kazoe"-aĝon,

tial ŝajne koreoj estis pliaĝuloj unu jaron.

En la juneco mi ankaŭ vivis en supre menciitaj kutimoj, sed hodiaŭ preskaŭ ĉio ŝajnas perdita. Do, retroiru al mia juneco, kaj ĝuu la feliĉan nov-jaron sufiĉe dum semajno.

Karaj aŭskultantoj, ĝis reaŭdo!

-----

retletero: radiocxerizo@gmail.com

Via voĉo estas bonvena; kaj postulu poŝtkarton por memoro.

Radio Ĉerizo Interncia  
© 国際言語研究所 提供